

EKO 2024

TRA LA
MONDO
IRAS FORTA
VOKO

Numero 2024:12, marto 15. Pezo: Word 40, PDF 310 KB, sume 390 KB

Sekvoj de la Tago de la Gepatra Lingvo

Februare okazis festa kunsido en UN honore al la Tago de la Gepatra Lingvo. Ĝin kunvokis la Misio de Bangladeŝo kaj kunaŭspiciis deko da landoj -- inter ili estis Aŭstrio, Bolivio, Brunejo, Hungario, Papuo-Nov-Gvineo, Rumanio, Sud-Afriko kaj Tanzanio. La kunaŭspiciantoj estis reprezentitaj de siaj ambasadoroj, kiuj alparolis la kunsidon. Alparolis la Prezidanto de la Ĝenerala Asembleo (el Trinidado) kaj la kunordiganto de UN pri multlingvismo (kiu samtempe estras la administradon de la Ĝenerala Asembleo, inkluzive de la lingvaj servoj), nome de la Ĝenerala Sekretario.

La sola invitita reprezentanto de Neregistaraj Organizo estis la prezidanto de la Komitato de NROj pri Lingvoj -- nome nia Francis Hult. Lia temo estis pli vasta ol simple Esperanto, sed li tamen sukcesis menciigi Esperanton -- kaj faris tion do en vere prestiĝa cirkonstanco. Fakte, la solaj parolantoj kiuj ne estis aŭ reprezentantoj de misioj aŭ stabanoj de UN estis Francis kaj reprezentanto de la urbestro de Novjorko. Mi spektis la tuton per UN-TV, kiu dissendis la tutan duhoran kunvenon.

La ambasadoro de Tanzanio menciis, ke la jaro 2024 estis deklarita de la Afrika Unio kiel la Jaro de Edukado en Afriko. Trairpordo por la kongreso en Aruŝo. Vidu:

<https://www.unesco.org/sdg4education2030/en/articles/podcast-education-african-union-theme-year-2024> .

Humphrey Tonkin

Pri la venonta studosemajfino en Nederlando

Tio okazos en la Naturamika Domo Krikkenhaar, apud Almelo, de la 12-a ĝis la 14-a de aprilo. Ni antaŭvidas lecionojn en kvin grupoj, de komencantoj ĝis spertuloj. La instruistoj estos Roel Haveman, Bert de Wit, Rob Groeneveld, Marc van Oostendorp kaj Yves Nevelsteen. La unuaj tri estas 'veteranoj'. Ni aparte bonvenigas Marc, kiu unuafoje instruos ĉe ni, kaj Yves, kiu denove kontribuos post kelkjara paŭzo. La foto: partoprenintoj el antaŭa studsemajno kun diplomoj.



La studosemajfino estos la perfekta okazo por komenci lernadon de Esperanto, praktiki rete akiritajn sciojn, aŭ pliprofundigi vian konon de la lingvo. Vi havos eblon aĉeti librojn de la libroservo, kiun Yves kunportos el Flandrio. Ne prokrastu aliĝon tro longe. Ĝis baldaŭa revido en Krikkenhaar!

Arjen-Sjoerd de Vries, el la revuo Fenikso 2024-2.

Invito al komuna legado kaj luktado

En la 10-a de marto, komenciĝis la 86-a Internacia Esperanto-Sumoo. Dum du semajnoj ni, la partoprenantoj, ĉiun tagon legas la libron, kiun ni elektis, kaj kvanton da paĝoj, kiun ni mem decidis, kun 300 esperantistoj tra la mondo. En la solidara sento ni povas ĝui legadon de Esperanto-libroj. Tiu sumoo estas la plej granda legmovado en la homa historio, danke al Esperanto kaj interreto. Mi atendas vian partoprenon. Pli detale vizitu nian retejon: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>

HORI Jasuo, Retadreso: hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp

BET 2024 en Estonio, en 2025 en Litovio

La 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59) okazos inter la 5-a kaj 13-a de julio 2025 en la Universitato Vytautas la Granda en Kaŭno (Litovio). Legu pli ĉe *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2024/02/bet-143/>

SMG: Kaŭno estas urbo kun granda Eo-historio. Zamenhof mem loĝis tie iam, ĝi havas (aŭ havis) Esperanto-straton kun iama Eo-centro.

Togolanda APETito

La 2-an de marto 2024 estis speciala tago por Esperanto kaj precipe por Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando (APETO). Unuafoje organiziĝis ekskurso al la urbo Kpalimé kunlabore inter pluraj junularaj grupoj de la publika universitato de Lomeo kaj ne-universitataj grupoj. La vizito altiris ĉirkaŭ sepdek partoprenantojn, de studentoj ĝis entreprenistoj, inkluzive funkciulojn. Ĉi tiu impresa aranĝo okazis la tutan tagon en etoso de kundivido, studado, malkovr(ig)o kaj ankaŭ de ĝuo. Tion ankaŭ markis la partopreno de APETO kaj de diversaj provizantoj de servoj, tiel reliefigante la gravecon de kunlaboro inter junuloj por antaŭenigi enlandan disvolviĝon. Krom grimpo al la pinto de Agou - la plej alta monto en Togolando, fotado, ludoj, estis pluraj aliaj aktivaĵoj el kiuj vizito al la bazaro de Kpalime, metiista centro, monumentoj de mortintoj, la lago kaj akvofalo de Kpimé, Estis mallonga prezento de Esperanto, kurseto pri ĝi kaj disdono de kalendaroj kaj aliaj Eo-flugfolioj fare de la partoprenantaj esperantistoj. La foriro okazis de la universitato de Lomeo.

Adjévi Adjé.

Eŭro-televizia festo kaj Esperanto!

La ĉi-jara kantofestivalo *Eurovision* okazos de la 7-a ĝis la 11-a de majo en la urbo Malmö en Svedio. La Respubliko San-Marino ĝis nun ne decidis pri la elekto de la prezentota kanto, do tial en la fino de februaro 2024 oni organizis lokan kanto-elektan konkurson. La konkurso havis apartan specifaĵon, ja **unu el la kantoj sonis en Esperanto**, kun la titolo *Mi sangas sen vi*. Ĝi estis kantita de la rumana kantisto Sandro Machado.

La loka kantokonkurso kompreneble ricevis vastan lokan median subtenon. La Esperantlingva kanto bedaŭrinde ne trafis la finalon, sed eĉ sen tio ĝi havas historian signifon, ja **okazis la unuan fojon, ke Esperanta kanto aperis en la kadro de la**

Eurovizia konkurso. Ni gratulas al Sandro Machado, kaj scivole atentus, kiam, kiu lando sekvis la ekzemplon? Vidu la kanton ĉe: <https://youtu.be/Cc2AIWTPJII>
Komunikon pri la konkurso aliris en Hungario rigardantaro de 41 373 ne-miovidantoj.

László Szilvási

La virina tago festata en Ĉinio

Okaze de la Internacia Virina Tago (mar. 8) mi bondeziras al esperantistinoj gajon kaj sanon. Inter la 1-a kaj 8-a de marto 2024 Liaoning Esperanto-kultura Klubo (LEKK) faris printempan varbon por la 9-a (reta) Esperanto-kurso. Jam 61 personoj el 12 provincoj anoncis sin por la kurso. En la 24-a de marto okazos malferma ceremonio de la kurso. Antaŭ la ceremonio la varbo daŭros. Ni anticipu dankas vin se vi konsideras instigi niajn novajn lernantojn kaj gratuli la kurson.

Wu Guojiang, Prezidanto de Liaoning Esperanto-Kultura Klubo, Ĉinio

La infana kongreseto en Aruŝo

Mi vizitis la lokon elektitan por la infankongreseto en Aruŝo, okaze de la Universala Kongreso, kaj ĝi aspektas tute taŭga. Mi esperas, ke ankaŭ en Aruŝo okazos bela Internacia Infana Kongreseto: ni mendis la tutan lokon kun 500 m² da privata herbejo tuj apud la ĉambroj. Dua bulteno baldaŭ venos.

François LO JACOMO

La infana kongreseto en Italio

Ni jam raportis en EKO 10 pri la itala kongreso mem. Unu el du infanaj kongresoj ligiĝos al tio. De la 24-a ĝis la 31-a de aŭgusto la itala kongreso okazos en Montecatini Terme, ĉe la kvar-stela *Grand Hotel Nizza et Suisse*, kie la kongresanoj loĝos kaj manĝos, kaj kie estas kelkaj el la kongresaj salonoj, kaj naĝejo libere disponebla por la kongresanoj. La ceteraj salonoj estas en la apuda Turisma oficejo kaj en la vidalvida granda Parko de la Varmbanejoj, kie ankaŭ ni organizos la kongresajn koncertojn kaj aliajn artajn aranĝojn, kaj kie la kongresanoj disponos pri la historia varmbanejo Tamerici. Al la kongreso jam aliĝis familioj kun infanoj, kun kiuj ni interkonsentis ke ni organizos ankaŭ tie infanan kongreseton. Ligilo al la kongresa paĝaro estas: <https://kongreso.esperanto.it/90>

Se vi interesiĝas, bv skribi rekte al: Brucjo Kasini <brunetto.casini@esperanto.it> kun kopio al la itala federacio ĉe <fei@esperanto.it>

Universitataj informoj

La kunkpensigado de la 6-a de marto evoluis glate. Komence Arko raportis pri la eko de kurso pri Esperanto en la Fremdlingva Universitato en Pekino. Sekvis informo de Philippe Planchon pri la progreso de la simpozio rilataj al konstruitaj lingvoj en Francio

<https://icon2024.sciencesconf.org/?forward-action=index&forward-controller=index&lang=fr>

Ahmad Mamduhi raportis pri la landa kongreso de iranaj esperantistoj en la universitato de Teherano. Ilona Koutny raportis pri lastaj agadoj kaj planoj en Poznan ĉefe rilate al eldonado en la revuo *Investigationes Linguisticae* kaj al la

sekcio pri interlingvistiko en la monda kongreso de lingvistoj, kiu publikigas artikolojn pri interlingvistiko kaj pri la sekcio pri interlingvistiko kadre de la fama Internacia Kongreso de Lingvistoj (8-15 aŭg: <https://icl2024poznan.pl/?id=2>).

Vidu ankaŭ: (<http://pressto.amu.edu/il>)

Renato Corsetti kaj Ilona Koutny

Himalajaj herooj

La bildo parolas per si mem. Legu la nomon de la evento sur la ekrano.



Foto de Indu Devi Thapaliya

===== vortoj: 1250 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikoj estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>.